



# Ni Semas Esperanton

Sesmonata Bulteno

Januaro 2020 n-ro: 6



kunordiganto. Kiel profesie okupata kuracisto kaj prezidanto de Irana E-Asocio, mi klopodas dediĉi tempon por tiu grava tasko. Certe mi bezonas helpon, speciale de la samideanoj tra la teritorio por progresigi la movadon en la regiono.

Okazos venonta MONA kunsido en Turkio, en tre bela loko. Estos tempo por kolektiĝi, interŝanĝi spertojn, amuziĝi kaj tiel plu. Do mi invitas vin ĉiujn partopreni en nia kunsido. Ne longe post tiu kunsido, okazos Irana E-Kongreso en Tehrano. Irano ankoraŭ estas sekura kaj se restos tia

ĝis la planita tempo, mi invitas vin ĝui la etoson de irana movado per partopreno en tiu evento.

Karaj legantoj:

Kiam mi skribas ĉi tiu tekston, konfliktoj sur la mezoriento pli kaj pli ardiĝas kaj la risko de milito venas al sia zenito. En tia atmosfero, esperantistoj ankoraŭ batalas por sia lingvo kaj paco. Vi povas legi raportojn pri diversaj esperantaj eventoj sur la teritorio de mezoriento kaj nordafriko (MONA). Kia estos la situacio en la regiono kaj antaŭvido pri Esperantomovado? Mi ne scias. Sed mi rememoras, ke almenaŭ irananoj neniam forgesis Esperanton kaj eĉ kiam oni bombardis Teheranon, ni havis E-kursojn.

Mi esperas, ke la nova jaro 2020 estu fruktodona por E-movado. La numero 20 estas la plej alta grado en iranaj lernejoj kaj 2020 donas la senton de granda sukceso.

Amike via,  
**Keyhan Sayadpour**  
Kunordiganto de MONA

Mi akceptis ĉi-somere la respondecon de MONA

## MONA Informado

*Esperanto en MONA regiono, la Mez-Orientaj, Nord-Afrikaj kaj najbaraj landoj*

**Esperanto**    **ასპერანტო**    **اسپرانتو**    **Ասպերանտո**

**MONA**    **الاسبرانتو**    **اسپرانتو**    **Ասպերանտո**

**ESPERANTO**    **اسپرانتو**    **اسپرانتو**    **Ասպերանտո**

**MONA**    **الاسبرانتو**    **اسپرانتو**    **Ասպերանտո**

EKO    Tempolinio    Komisiono    Kunvenoj    Informilo    MONA Bulteno    Pri ni    Kontaktoj

**Aperis la 5-a MONA Bulteno.**

Por elŭti ĝin kaj la antaŭajn numerojn aŭ por legi la lastan numeron rete bonvolu iri al la menuero "MONA Bulteno".

Ne forgesu, ke vi povas aboni al nia retejo libere lasante vian retpoŝtadreson. Por tio bonvolu iri al la dekstra flanko de la retpaĝo.

**Jen ligilo por la menuero:**

<https://monainformado.wordpress.com/2019/08/03/mona-bulteno-5/>

<https://monainformado.wordpress.com/>



<https://monainformado.wordpress.com/>

**Lastatempaj Esperanto Agadoj en Irano**

*Mi elkore salutas vin el Irano!*

*Ekde nun mi sendas raporton pri agado en Irano por MONA bulteno kaj informilo!*

*Jen mia raporto pri la lastaj agadoj:*

**Hamid Babadi Akasheh**

1. En la solena fermo de la 104-a Universala Kongreso en Lahtio estis anoncitaj la nomoj de 12 ricevantoj de diplomo pri Elstara Agado kaj Diplomo pri Elstara Arta Agado;

Unu el 12 ricevantoj, estas s-ro Reza Kheir-khah (Irano-Tajvano) fama irana esperantisto pro la longtempa elstara agado kiel instruisto de Esperanto por la tajvana movado kaj eldonisto de la revuo «Formoza Folio» kiu sukcesis ricevi ĉi tiun diplomon.

S-ro Kheir-khah komencis Esperanto-agadon ekde 1989 kaj pligrandigis la zonan de sia aktivado pri Esperanto-movado, en multaj landoj kiel Nederlando, Belgio kaj Hispanio ĝis Ĉinio, Japanio, Koreio kaj Tajvano; li nun instruas Esperanton kaj estas la eldonisto de la revuo Formoza Folio, ankaŭ tre aktive laboras en la Esperanto-movado en Tajvano.

Tiuj diplomoj estas aljuĝataj de la Estraro de UEA

ekde la jaro 2007.

<http://uea.org/aktuale/komunikoj/2019/12-elstaraj-agantoj-premiitaj-en-Lahtio>



2 . La 7-a Irana Esperanto-kongreso temas pri longdaŭra turismo kaj okazos en Tehrano je la 16a ĝis la 18a de aprilo 2020.

Eksterlandanoj estas aparte invitataj partopreni.

<http://www.espero.ir>  
[Info@espero.ir](mailto:Info@espero.ir)

3 . Daŭrigi Esperanto-kurson en Allame Tabataba'i Universitato(ATU) en Tehrano per s/iĝh Ahmadreza Mamuduhi. Dum por instruado de aliaj lingvoj en la

**Irana Esperanto-Asocio**  
Unu el La Plej Grandaj Asocioj de Esperanto en Mezoriento

Se Vi Deziras Sperti La Iranan Gastamon? Prenu Vian Valizon Kaj Venu al Ni Ni Ĉiuj Atendas Vin :)

Venonta Kunveno: LA 7-A IRANA KONGRESO DE ESPERANTO

Pliaj informoj kaj vojaĝo al Irano [www.espero.ir](http://www.espero.ir) [Info@espero.ir](mailto:Info@espero.ir)

Multe da Turismaj Allogoj kaj Aliaj Interesaj Aferoj Farendaj en IRANO

Lingvo-instrua Centro de ATU ekzistas ĉirkaŭ 20 gradigitaj kursoj (ekz-e 21 hierarkiaj kursoj por la angla), lernigado de Esperanto, kiel menciite en la reklamoj kaj ene de la fakultato kaj en ties ciferaj informiloj, okazas nur tra tri niveloj: Baza, meza kaj progresiga.

Alia agado estas reklamado pri instruado de Esperanto antaŭ instruado de aliaj 10 lingvoj, por utili la propedeŭdikan rolon de Esperanto en la Lingvo-instrua Centro de ATU.



4 . Kun la diligenteo de s-ino Simin Emrani kaj IREJO (Irana esperantista junulara organizo), nova eldono de la lernolibro “JUNULKURSO” estas eldonita.



5 . Daŭrigo de la monataj prelegoj en la IREA-oficejo; unua dimanĉo de ĉiu-monato laŭ Irana kalendaro okazas.

### Nova Komisiono de MONA

(9/9/2019)

Mi ĝojas informi, ke en sia kunsido lastan sabaton (7/9/2019) la estraro de UEA unuanime aprobis la konsiston de la MONA-komisiono.

#### Prof. Amri Wandel

Scienca kaj Faka Agado, Meza Oriento kaj Norda Afriko

UEA

- \* Keyhan Sayadpour – Irano (kunordiganto)
- \* Annie Grente – Francio
- \* Wael Almahdi – Barejno
- \* Park Chung Kil – Kuvajto
- \* Vasil Kadifeli – Turkujo
- \* Murat Özdizdar – Turkujo
- \* Stefan MacGill – Hungario
- \* Hamzeh Shafiee – Irano
- \* Prof. Amri Wandel – Israelo



Karaj geamikoj, Okaze de la juda novjaro mi deziras al ni ĉiuj sukceson, feliĉon, sanon kaj renoviĝon. En la pasinta jaro niaj ĉefaj atingoj:

1. Ni okazigis du sukcesajn kursojn (por komencantoj, instruita de Edad, kaj por progresantoj, de Doron).

2. Ni organizis sukcesan jubilean Israelan Kongreson en Eilat kun rekorda nombro de eksterlandaj gastoj, kaj tri postkongresaj ekskursoj.

3. Ni sukcesis plu eldoni nian altkvalitan bultenon, kun nova redaktoro – Mikaelo Lineckij.

4. Malgraŭ la drasta plialtiĝo de la UEA-kotizo, ni sukcesis reteni ĉiujn delegitojn kaj malaltigi la antaŭviditan falon en la individua UEA-membraro. Tion ni ŝuldas al la sindona ĉefdelegito Jehoshua Tileman

5. Malgraŭ pluraj juraj kaj burokrataj postuloj flanke de la Registristo, kiu daŭre tre severe kontrolas nin sekve de la denunca letero, ni sukcesis reakiri oficialan aprobon de bona mastrumado, ĉefe dank al

la sindona laboro de nia kasisto Shlomo Shahr.

6. Reteni la regulan funkciadon de la Tel Aviva klubo, dank al ĝiaj gvidantoj, Michal kaj Eldad.

Por la venonta jaro ni jam havas plurajn gravajn planitajn projektojn:

— Malfermi komencantan kurson (instruota denove de Eldad)

— Organizi la 21-an Israelan Kongreson en Tel-Avivo. Sekve de intensa reklamado dum la someraj konferencoj (UK kaj BET) jam estas garantiita la partopreno de preskaŭ dek artistoj, kaj multaj eksterlandanoj plu interesiĝas. Ĝi jam havas apartan retpaĝon: <http://esperanto.org/il/ik.html>

Do, sukcesan jaron ankaŭ al Esperanto enlande kaj tutmonde,

**Amri Wandel**  
Prezidanto de ELI

Karaj,

Okaze de la 14-jariĝo de la Monataj Esperantaj Prelegoj en la Irana Esperanto-Asocio, mi prezentis prelegon titolitan “La Angla, Kial ne!”.

Eble vi aŭdis, ke en Irano kelkfoje oni parolis kontraŭ la angla, kaj eĉ proponis anstataŭigi ĝin en la lernejoj kaj altlernejoj per la rusa aŭ/kaj la ĉina – aŭ eĉ internaciigi la persan!

Mi sendas PowerPoint-dosieron de mia prelego.

Dankon kaj estimon,  
Amike kaj samideane

**Ahmad Reza Mamduhi**

Por elŝuti la dosieron bonvolu klaki sur la supran bildon aŭ sur le jenan ligilon:



<https://mega.nz/#!BVwVwAAT!-t5bBAITVbh9-y7VdVTj9KqUlgRmeJ8hgmFDSdgTRc>

Jen la plej bela maniero ekpartopreni la festadon de la 75-a datreveno de UN!

Karaj,

Unuiĝintaj Nacioj lanĉas tutmondan debaton pri la nuntempo kaj estonteco de UN – okaze de la 75-jara jubileo de la organizaĵo. Ĝi anoncis tion per nova retejo en siaj ses oficialaj lingvoj. Ĉar la sekretariato laboras en du lingvoj – la angla kaj la franca – oni atendus, ke minimume tiuj du lingvoj estus uzataj por

kunordigi la debaton.

Sed jen kuriozaĵo. Se vi turnas vin al la franclingva versio de la retejo (<https://www.un.org/fr/un75>), vi legos, supre dekstre, “Contactez-nous (en anglais)”. Se UN volas engaĝi la mondon kaj jam en la komenco limigos sin al la angla lingvo (kontraŭ la propra lingva politiko, kaj kontraŭ ĉiuj normoj de inkluzivo), la rezultoj ne montriĝos tre inkluzivaj.

Ni petas vin – kaj precipe la franclingvanojn – rapide kaj trafe reagi, utiligante la paĝon “contactez-vous” por protesti kontraŭ tiu evidenta lingva

diskriminacio. Franclingvanoj nepre uzu la francan en via reago. Parolantoj de aliaj lingvoj uzu aŭ siajn lingvojn aŭ la franca. Unuiĝintaj Nacioj apartenas al la tuta mondo, ne nur al anglalingvanoj. Ni malfermu UN al lingva diverseco! Ni forigu lingvan diskriminacion!

Cetere, ni jam sendis la unuan proteston. Aldonu vian voĉon. Ni vidu chu UN modifos la koncernan instrukcion...


Kaj bonvolu atentigi viajn geamikojn per sociaj medioj...

**Humphrey Tonkin**

President & University Professor of the Humanities, Emeritus



Façonnons notre avenir ensemble



## Arabaj Noktoj - 4-a Nokto

(15/11/2019)

Kiam estis la kvara nokto, Dunjazad petis ŝin fini la rakonton, se ŝi ne estas dormema kaj do ŝi daŭrigis:

Mi aŭdis, ho bonŝanca reĝo, ke kiam la fiŝkaptisto sciigis la ifriton, ke li ne kredos je li, ĝis kiam li vidos tion propraokule, tremo trakuris la ifriton kaj li fariĝis nuboj de fumo ŝvebanta super la maro. Tiam la fumo densiĝis kaj eniris la botelon iom post iom, ĝis ĝi estis entute en ĝi. Rapide la fiŝkaptisto prenis la kupran ŝtopilon kun la enskribo kaj metis ĝin sur la malfermaĵon de la botelo. Li ekriis al la ifrito:

“Demandu min, kiel vi volas morti. Je Dio, mi forĵetos vin en la maron kaj tiam mi konstruos domon por mi en ĉi tiu loko, por ke mi haltigu ĉiujn, kiuj venos ĉi tie por fiŝkaptado dirante al ilin, ke estas ifrito ĉi tie, kiu donas, al iu ajn kiu, alportos lin el la maro, elekton, pri kiel li volas esti mortigita.”

Kiam la ifrito aŭdis tion kaj trovis sin malliberigita en la botelo, li strebis eliri sed ne povis, ĉar li estis malhelpata de la sigelo de Salomono, kaj li komprenis, ke la fiŝkaptisto trompis lin. “Mi nur ŝercis,” li diris al la fiŝkaptisto, kiu respondis: “Vi mensogas, vi la plej malestiminda, malbona kaj sensignifa el la ifritoj,” kaj li prenis la botelon. “Ne, ne,” ekriis la ifrito, sed la fiŝkaptisto diris: “Jes, jes”, ĉe kio la ifrito petis lin milde kaj humile, kion li intencis fari kun li. “Mi intencas ĵeti vin en la maron,” la fiŝkaptisto diris al li. “Vi eble estis tie por mil okcent jarojn, sed mi vidos vin, ke vi restu tie ĝis la Lasta Trumpet-sono (1). Ĉu mi ne diris: ‘Indulgu min, kaj Dio indulgu vin, kaj ne mortigu min, kaj Dio ne submetu vin en la povon de tiu, kiu mortigos vin? Sed vi rifuzis kaj agis perfide al mi. Dio jam metis vin en mian povon kaj mi faros la

samon por vi. “Malfermu la botelon,” petegis la ifrito, “do ke mi povu fari al vi la bonon.” “Damninda mensogulo,” diris la fiŝkaptisto. “Vi kaj mi estas kiel la veziro de Reĝo Junan kaj Duban la saĝulo.” “Kiu estas iliaj rakonto?” demandis la ifrito, kaj la fiŝkaptisto respondis:

Vi, ifritio, devas scii, ke iam en la malnova tempo en la lando de Ruman (2) estis reĝo nomata Junan en la urbo de Fars. Li estis riĉa kaj digna viro kun trupoj kaj gardistoj de ĉiuj raso, sed li estis ankaŭ leprulo, kiu prenis medikamentojn de diversaj specoj kaj uzis unĝentojn, sed lian malsanon kuracistoj kaj kleruloj ne estis kapablaj kuraci.

Estis maljuna kuracisto konata kiel Duban la saĝulo, kiu estis studinta la librojn de la grekoj, la persoj, la araboj kaj la sirianoj. Li estis majstro de medicino kaj de astronomio kaj estis sperta pri la fundamentaj principoj de sia temo, kun scio pri tio, kio estis utila kaj kio estis malutila. Li konis la herbojn kaj plantojn, tiujn, kiuj estis malhelpaj kaj tiujn, kiuj estis helpaj, kaj mastrumis filozofion, kune kun ĉiujn branĉojn de medicino kaj aliaj sciencoj. Kiam tiu viro alvenis al la urbo, ene de kelkaj tagoj li aŭdis ke la reĝo suferadis pro lepro kaj ke neniu kuracisto aŭ alia klera homo estis kapabla lin sanigi. Li pasigis la nokton pensante pri la problemo, kaj kiam la suno leviĝis li surmetis sian plej brilan veston kaj iris al la reĝo, kisis la teron antaŭ li kaj elokvente parolis pri la daŭrigo de lia gloro kaj feliĉo. Post prezentado de si, li daŭrigis: “Mi aŭdis, via reĝa moŝto, pri la malsano, kiu afliktas vin kaj ke, kvankam vi estas traktita de multaj kuracistoj, ili estis nekapablaj forigi ĝin. Mi resanigos

---

vin sen doni al vi ajnan medikamenton por trinki aŭ apliki ajnan unguenton.

Junan miris aŭdi tion, kion Duban devis diri kaj demandis kiel li farus tion, promesante riĉigi lin kaj liajn infanojn. "Mi duŝos favorojn sur vin," li diris, "kaj donu al vi ĉiujn viajn dezirojn, prenante vin kiel kunulon, grandan helpanton kaj karan amikon." Li tiam prezentis al Duban tunikon de honoro kaj traktis lin per favoro, antaŭ ol demandi: "Ĉu vi vere kuracos mian lepron sen medikamentoj aŭ unguentoj? Duban certigis ke li kuracos la regon tiel, kaj la mirigita reĝo demandis kiam tio okazos, instigante lin esti rapida. "Aŭdi estas obei," respondis Duban, promesante fari tion tuj en la sekvanta tago.

Duban tiam revenis al la urbo, kie li luis domon en kiu li deponis siajn librojn, medikamentojn kaj drogojn. Li prenis iom el la lastaj kaj metis ilin en polobastonon, por kiu li faris tenilon, kaj uzis sian lertecon por desegni pilkon. La sekvan tagon, post kiam li finis tion, li iris en la ĉeesto de la reĝo, kisis la teron antaŭ li, kaj sciigis al li eliri al la polo kampon por ludi. La reĝo estis akompanita de la emiroj, ĉambelanoj, veziroj kaj ŝtataj funkciuloj, kaj antaŭ ol li prenis sian sidlokon sur la kampo, Duban alproksimiĝis al li kaj transdonis al li la bastonon. "Prenu ĉi tion," li diris. "Tenu ĝin ĉi tiel kaj kiam vi rajdas sur la kampon, trafu la pilkon per plena svingo ĝis la palmo de via mano komencos ŝviti, kune kun la resto de via korpo. La drogo tiam eniros tra via palmo kaj disvastiĝos tra la resto de vi. Kiam vi finos kaj la drogo estos penetrinta, reiru al via palaco, lavu vin en la banejoj kaj iru dormi, ĉar vi estos resanigita. Tio estas ĉio."

Je tio, la reĝo prenis la bastonon el li kaj ekrajdis tenante ĝin en sia mano. Li ĵetis la pilkon antaŭ si kaj rajdis post ĝi, batante ĝin forte, kiam li povis renkontiĝi kun ĝi, kaj tiam sekvis ĝin por bati ĝin denove ĝis lia manplato kaj la resto de lia korpo iĝis ŝvita pro la firma tenado de la bastono. Kiam Duban vidis ke la drogo jam estis penetrinta en la korpon de la reĝo, li ordonis ke la reĝo reiru al sia palaco kaj banu sin tuj. La reĝo reiris tuj kaj li ordonis ke la banejo estu purigita por li. Tio okazis, kaj dom-knaboj kaj sklavoj rapidis al li kaj preparis vestojn por li por surmeti. Li tiam eniris la banejon, lavis sin ĝisfunde kaj vestiĝis antaŭ ol li eliris, post kio li iris reen al sia palaco kaj endormiĝis.

Tiom pri li, sed pri Duban la saĝulo, li revenis kaj pasigis la nokton en sia domo, kaj matene li revenis peti permeson vidi la reĝon. Post permeso li eniris, kisis la teron antaŭ la reĝo kaj alparolis al li per tiuj versoj kiujn li kantis:

---

*Virtoj estas noblaj kiam estas vi ilia mastro  
Ĉar neniu povas preni al si belan ĉi-titolon.  
Brilo el vizaĝo via disiradas kiel astro  
de enuo pro negocoj ĝi tuj kaŭzas la abolon.  
Via la vizaĝo lumos tutan vivon sen egalo,  
sed ĝi ja sulkiĝos iom pro atako de la Tempo.  
Sen avaro vi donacis al mi kvazaŭ pro regalo,  
kiel pluvo portas bonon al la kampoj dum printempo.  
Pro grandanimeco de vi, ne plu estas la kapitalo,  
Sed de via altaj celoj vi baniĝis en la trempo.*

Kiam Duban finis tiujn liniojn, la reĝo stariĝis kaj brakumis lin, antaŭ ol li sidigis lin apud si kaj prezentis lin per belaj honor-robtoj. Tion li faris ĉar forlasante la banejojn li trarigardis sian korpon kaj trovis, je sia granda ĝojo kaj trankviliĝo, ke ĝi estis pura kaj arĝento-blanka, montrante neniun postsignon de lepro. Matene li iris al sia kortego kaj prenis sian sidlokon sur sia reĝa trono, dum la korteganoj kaj la oficistoj de la ŝtato ĉiuj antaŭstaris ĉe li, kaj tiam Duban alvenis. La reĝo leviĝis rapide por li kaj post kiam la saĝulo ekvidis apud li, grandiozaj tabloj de manĝaĵoj estis preparitaj kaj li manĝis kun la reĝo kaj akompanis lin dum la resto de la tago. La reĝo tiam faris donacon al li de du mil dinaroj, krom la vestoj de honoro kaj aliaj donacoj, post kio li surĉevaligis lin sur sian propran ĉevalon.

Duban reiris hejmen, lasante la reĝon plenplena kun admiro por tio, kion li faris, kaj dirante: "Ĉi tiu homo traktis min eksteren ne uzante ajnan ŝmiraĵon. Je Dio, tiu estas lerteco de alta ordo! Li meritas donacojn kaj favorojn kaj mi ĉiam traktos lin kiel amikon kaj akompanaton." La reĝo pasigis feliĉan nokton ĝojigis la sanecon de lia korpo kaj lian liberigon de la malsano. La venontan tagon, li eliris kaj sidiĝis sur sian tronon, dum liaj ŝtatoficistoj staris kaj la emiroj kaj veziroj sidiĝis dekstren kaj maldekstren de li. Li alvokis Duban, kiu eniris kaj kisis la teron antaŭ li, je kio la reĝo leviĝis, salutis lin, sidigis lin apud si kaj manĝis kun li. Li tiam prezentis lin kun pli da robtoj de honoro kaj ankaŭ donacoj, kaj parolis kun li ĝis kiam noktiĝis, tiam li donis al li aliajn kvin vestojn de honoro kune kun mil dinarojn, post kio Duban iris dankeme hejmen.

La sekvan matenon, la reĝo venis al sia kortego, kie li estis ĉirkaŭita de siaj emiroj, veziroj kaj ĉambelanoj. Inter la veziroj estis malbela kaj malbonaŭgura viro, malmorala, avara kaj tiel envia, ke lin ekamis envio. Kiam tiu viro vidis, ke la reĝo prenis Duban kiel intimulon kaj rekompencis lin per favoroj, li fervoris kaj planis malutili al li. Ĉar, tiel la vortoj diras: "Neniu estas libera de envio" kaj "Maljusteco estas

kaŝata en la animo; forto montras ĝin kaj malforto kaŝas ĝin.”

Ĉi tiu veziro alproksimiĝis al Reĝo Junan, kisis la teron antaŭ li kaj diris: “Reĝo de ĉi tiu epoko, mi kreskis ĉirkaŭita per via malavareco kaj mi havas iun gravan konsilon por vi. Se mi kaŝus ĝin de vi, mi ŝajnegus esti bastardo, sed se vi demandas, ke mi donu ĝin al vi, mi faros tion.” Junan estis perturbita de tio kaj diris: “Kia estas tiu konsilo de vi?” La veziro respondis: “Granda reĝo, estis dirajo de la antikvuloj, ke Tempo ne estas amiko al tiuj, kiuj ne observas la konsekvencojn de siaj agoj. Mi rimarkis, ke via majesto estas erare montranta favoron al malamiko, kiu provas detrui vian regnon. Vi traktis tiun viron kun grandanimeco kaj faris al li la plej grandan honoron, prenante lin kiel intimumon, tio estas io, kio plenigas min kun timo.”

Junan maltrankviliĝis; lia koloro ŝanĝiĝis kaj li demandis la veziron, pri kiu li estis parolanta. “Se vi estas dormanta, vekigu,” la veziro diris al li kaj daŭrigis: “Mi parolas pri saĝulo Duban.” “Damnon al

vi,” ekkriis Junan. “Li estas mia amiko kaj la plej kara el la homoj al mi, ĉar li kuracis min per io, kion mi nur tenis en mia mano, de malsano kiun neniu alia kuracisto povus trakti. Iu kiel li ne troviĝas en ĉi tiu tempo aŭ en ĉi tiu mondo, de okcidento ĝis oriento. Vi povas akuzi lin, sed hodiaŭ mi atribuos al li pagon kaj kromsalajron, kun monata enspezo de mil dinaroj, dum eĉ se mi kundividus mian regnon kun li, tio estus tro malmulta. Mi pensas ke envio faris vin diri tion, kiu memorigas min pri la rakonto de Reĝo Sindbad.

Nun mateniĝis kaj tagiĝis kaj Ŝahrazad ĉesis rakonti, laŭ la permeso, kiun ŝi estis ricevinta.

(1) *‘La Lasta Trumpeto’ en iuj religioj estas la trumpeto kiu sonos dum apokalipso kaj ĉiuj mortintoj leviĝos.*

(2) *‘Rum’ aŭ ‘Ruman’ teorie montras Konstantinopolon kaj pli ĝenerale la bizancajn landojn, sed en kelkaj rakontoj tiu nomo signifas strangan kaj ĝenerale kristanan, foran landon.*

## Zamenhofa tago

(5/12/2019)

### Bonvolu plusendi al viaj landaj kaj lokaj listoj



Pro peto de la estrarano pri informado, kiu ĵus revenis el Pekino kaj klopodos dum la venontaj tagoj rekapti sian normalan labor-ritmon, mi nun dissendas ĉi tiun ‘Saluton de UEA okaze de la 160-a dat-reveno de L. L. Zamenhof kaj inviton festi ĝin’ kaj du afiŝetojn, kiujn vi eventuale povos uzi.

Ludoviko Lazaro Zamenhof naskiĝis antaŭ 160 jaroj. Li iniciatis la internacian lingvon Esperanto ne ĉar li interesiĝis pri lingvoj, sed ĉar li interesiĝis pri paco. Kaj paco povas ekzisti kaj daŭri nur se ĝi baziĝas sur justeco kaj egaleco inter homoj, hom-grupoj, kaj popoloj.

Surbaze de ĉi tiuj valoroj la internacia lingvo Esperanto travivis unu el la plej sangaj jarcentoj de la homa historio, la 20-an, kaj ankoraŭ luktas por ĝeneraligi tiujn valorojn.

Fakte la mondo en la lastaj 160 jaroj kerne ne ŝanĝiĝis. Maltoleremo kaj perforto, deziro regi aliajn popolojn kaj perfido al sia grupo por ricevi avantaĝojn de la regantoj estas tre nuntempaj problemoj. Tio bedaŭrinde ofte prenas la formon de milito kun amasa mortigado de homoj aŭ de trudataj ekonomiaj limigoj, alivorte de trudata ekonomia malprogreso de la trafitaj landoj.

Religioj, kies kunlaboron Zamenhof alvokis dum la tuta vivo, nun estas uzataj kiel ilo por dividi kaj militigi inter si homojn.



Ĉu ni devas akcepti ĉi tiun situacion? Ĉu ni devas pensi, ke per la inteligentaj telefonoj komenciĝis nova epoko, nova civilizo, nova mondo?

Ne, ni ne devas kaj ne povas, kaj ni devas serĉi aliancinojn por vere plibonigi la mondon en la kampoj de paco, ekonomio, kulturo kaj homa feliĉo.

Se ni rigardas ĉirkaŭ ni, nur la Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj emus fari ion tian, ekzemple per siaj 17 celoj pri daŭripova eoluigo. Tiu organizaĵo, kiu ĉi-jare festas sian 75-an jariĝon, neniam atingos tiujn celojn, se ĝi restas kaptita de registaroj, kiuj vorte laŭdas tiujn celojn kaj fakte melhelpas la atingon de ili. Estos necese apogiĝi sur la kelkaj progresemaj registaroj en la mondo kaj sur la homoj, kiuj deziras pacon, progreson kaj feliĉon.

Estas tempo por UN aŭskulti la homojn kaj fari

siajn la idealojn de L.L.Zamenhof. Ili estas pli aktuale gravaj ol iam ajn antaŭe. Ne hazarde UEA, la monda organizaĵo de la parolantoj de Esperanto dediĉas al tiu temo sian mondan kongreson en Montrealo en 2020: "UN 75-jara: Dialogo kaj interkompreniĝo en ŝanĝiĝanta mondo."

Festu la zamenhofan tagon kaj poste subtenu la provojn plibonigi la mondon fare de la Esperantomovado kaj de UN.

**Renato Corsetti**

## Festado de la Zamenhof Tago

(14/12/2019)

Istanbulo estas grandega urbo. Ĉijare kadre de Zamenhof Tago ni faris du prezentojn al neesperantistoj en du apartaj lokoj en Istanbulo :

1) En la 12-a de decembro en la prezo en Şişli distrikto partoprenis nur unu neesperantisto.

2) En la 13-a de decembro en la prezo en Unkapanı distrikto partoprenis ok neesperantistoj.

Do, ni entute atingis naŭ (9) neesperantistojn. Bedaŭrinde, ke pasintjare estis pli da partoprenantoj.


En ambaŭ kunvenoj ni faris la jenajn prezentojn:

1) "Kio estas Esperanto"

2) "Enkonduka kurso al Esperanto" surbaze de la 16 reguloj de la Unua Libro. Jen ligilo por la prezo: <https://esperantoturkiye.wordpress.com/2017/11/22/dilin-16-kurali-uzerinden-hizli-bir-esperanto-kursu/>

En ambaŭ tagoj la intereso de la partoprenantoj estis sufiĉe alta.

Ni dankas al Fatma Eroĝlan por la organizado de



la du ejoj kaj Alp Kaan Aksu por la desegno de la afiŝoj.

## Zamenhofa Festo en Tel-Avivo

(15/12/2019)

Karaj geamikoj,

Ĉ. 40 s-anoj ĉeestis la Zam-feston okazinta ĉi semajne en Tel-Avivo. La distra programo komenciĝis per klasika muziko – pianludita de Doron. Sekvis prelego de Eran en la hebrea (rilate al Zamenhof), E-kantoj de Enrica, eŭritmia anekdoto pri "Hallelujah" prezentita de Tali kaj Mikaelo, hebrea kanto "Balado al virino" tradukita de Amir kaj kantita de Israela. Post la paŭzo Mikaelo prezentis miajn raporton pri la agado de ELI, prezidantan adiaŭon kaj prelegon pri la nepo de Zamenhof kiu forpasis antaŭ du monatoj (vidu la aldonitan prezentaĵon). Fine okazis balotoj por la nova estraro kaj debato.

Amike,  
**Amri Wandel**  
Prezidanto de ELI





שלום חברים,  
כ-40 חברים הגיעו למפגש זמנהוף השבוע. התכנית החלה בקטע נגינה של דורון, אחריה הרצאה בעברית של ערן על "שני אנשים שתי שפות". בהמשך שירים של אנריקה וישראלה, והצגת אוריתמיה בביצוע טלי ומיכאלו. כיון שלא יכולתי להגיע, מיכאלו הגיש את המצגת שהגעתי (מצורפת) עם דו"ח הפעילות השנתי,

דברי פרדה של היו"ר להרצאה על הנכד של זמנהוף שנפטר לפני חודשיים.  
לבסוף היו בחירות להנהלה החדשה ודין עמרי

## Zamenhofa-tago celebrita kun prelegoj kaj festoj en Irano

(18/12/2019)

Same kiel an aliaj landoj, kunveni kaj festi la naskiĝtagon de Zamenhof estas jam tradicia evento ankaŭ en Irano. Ĉi-jare, la 15-an de decembro estis peza polucio en Tehrano kaŭzante fermon de lernejoj kaj striktajn trafik-regulojn. Malgraŭ ege danĝera polucio, en la oficejo de Irana Esperanto-Asocio (IREA) kunvenis dek esperantistoj por festi la Zamenhof-tagon kun du prelegoj kaj multe da dolĉaĵoj apud kafo kaj kuko.

La unuan prelegon kies titolo estis "Esperanto, kial jes?" prezentis Ing. Mamduhi, kiu jam prezentis alian prelegon pasint-monate titolita: "La angla, kial ne?".

La duan prelegon titolita "kuraco kaj paco" prezentis d-ro Sayadpour.

Post la prelegoj, la partoprenantoj festis la naskiĝ-datrevenon de Zamenhof kaj fermis la kunvenon per komuna foto.

Samtage, esperantistoj en Sagez, urbo okcidente de Irano, okazigis Zamenhof-tagan feston por la unua fojo. La feston aranĝis f-ino Ŝler Karimi, aktiva esperantistino en Kurdistan-provinco.



## Arabaj Noktoj - 5-a Nokto

(20/12/2019)

Kiam estis la kvina nokto, Dunjasad petis sian fratinton fini la rakonton. se ŝi ne estas tiom multe dormema kaj Ŝahrazad diris:

Mi aŭdis ho bonŝanca reĝo, ke reĝo Junan akuzis sian veziron pro envio kontraŭ Duban kaj volis, ke oni mortigu lin. "Mi poste tion bedaŭros" aldonis Junan "kiel rego Sindbad poste bedaŭris, ke li mortigis sian falkon." "Pardonu min, mia Reĝa Moŝto," diris la veziro, "sed kiel estis tio?" Junan daŭrigis:

Vi devas scii, ke estis persa reĝo kun pasio por ĝuo kaj amuziĝo, kiu havis korinklinon por ĉasado. Li prizorgis falkon, kiu estis lia konstanta kunulo nokte kaj tage, kaj kiu pasis la nokton sidante sur lia pojno. Li kunprenis ĝin al ĉasado kaj ĝi havis oran bovlon farita por ĝi, kiu pendis de ĝia kolo, kaj de kiu ĝi povis trinki. Unu tagon la ĉefo de falkobredistoj venis tien, kie li estis sidanta kaj diris al li ke estas tempo iri

eksteren por ĉasado. La reĝo donis la ordonojn kaj forveturis kun la falko sur sia pojno, ĝis li kaj lia kompanio atingis valon, kie ili metis sian ĉas-linion. Kaptita en la ĉas-reto estis gazelo kaj la reĝo minacis, ke se iu ajn permesus ĝin salti super lian kapon tiu estos mortigita. Kiam la reton ili mallarĝigis, la gazelo venis tien, kie la reĝo tenis postenon, apogis sin sur siaj malantaŭaj kruoj kaj kunmetis la antaŭajn kruojn sur sia brusto, kvazaŭ ĝi estis kisanta la teron antaŭ la reĝo. Poste ĝi klinis sian kapon kaj tiam ĝi eksaltis super la reĝon, forkurante al la kamparon. La reĝo rimarkis, ke liaj viroj estis rigardantaj lin kaj palpebrumis unu la alian kaj kiam li demandis la veziro pri la signifo de tio kaj la veziro klarigis: "Ili atentigas ke vi diris se iu lasus la gazelon salti super lia kapo, li estus mortigota."

La reĝo tiam ĵuris. ke li ĉasos ĝin kaj li forrajdis al

persekuto, sekvante la gazelon ĝis li alvenis al monto. Tie preterpasante tra fendo la reĝo malligis sian falkon kaj la birdo forŝiris la okulojn de la gazelo, blindigante kaj stultigante ĝin, tiel ke la reĝo povis tiri sian hakilon kaj terenfrapi ĝin per sola bato. Li tiam deĉevaliĝis kaj tranĉis lian gorĝon, post kio li senfeligis ĝin kaj ligis ĝin al sia selo. Ĉar tio okazis tagmeze en varmego kaj la regiono estis dezerta kaj senakva, la reĝo kaj lia ĉevalo estis soifa nun. La reĝo gvatis ĉirkaŭen kaj malkovris arbon, el kiu io simila al likva butero gutadis. Portante paron da gantoj, li prenis la bovlon de la falko el ĝia kolo, plenigis ĝin per tiu likvaĵo kaj metis ĝin antaŭ la birdo, sed la birdo frapis la bovlon kaj renversis ĝin. La reĝo prenis ĝin kaj plenigis ĝin denove, pensante ke la falko devis esti soifa, sed la samo okazis tuj kiam li metis la bovlon duafoje antaŭ la birdo. Tio tedis lin, kaj li la trian fojon plenigis la bovlon kaj metis ĝin antaŭ sian ĉevalon, sed denove la falko renversis ĝin per sia flugilo. La reĝo blasfemis, kriante: “Vi la plej malbonsorta de birdoj, vi detenas min de trinkado, kaj vin mem kaj la ĉevalon”. Li tiam detranĉis ĝian flugilon kun bato de glavo, sed la birdo levis la kapon kvazaŭ por diri per gesto: “Rigardu la pinton de la arbo.” La reĝo levis la okulojn kaj kion li vidis estis idaro de vipuroj kies veneno gutadis malsupren. Tuj bedaŭrante tion, kion li faris, li surĉevaliĝis kaj rajdis reen al sia tendo, alportante kun si la gazelon, kiun li transdonis al la kuiristo, dirante al li preni ĝin kaj rosti ĝin. Dum li sidis sur la seĝo kun la falko sur lia pojno, la falko elspiris sian lastan spiron kaj mortis, lasante sian mastron ekkrii kun malĝojo pro tio, ke li mortigis ĝin, malgraŭ tio, ke ĝi savis lian vivon. Tiel finiĝas la rakonto de Reĝo Sindbad.

“Granda reĝo,” la veziro diris, “Sindbad agis eksternecese kaj mi povas vidi nenion malĝustan en tio. Mi mem agas pro simpatio por vi, por ke vi konsciu ke mi pravas, ĉar alie vi eble renkontos la saman sorton kiel la veziro kiu intrigis kontraŭ la princo.” “Kiel tio okazis?” La reĝo demandis, KAJ LA VEZIRO DIRIS:

“Vi devas scii, via reĝa moŝto, ke estis veziro en la servo de iu reĝo, kiu havis filon kun pasio pri ĉasado. Ĉi tiu veziro estis ordonita akompani la princon, kien ajn li iris, kaj do, kiam iun tagon la princo iris ĉasi, la veziro rajdis kun li. Rajdante ili ekvidis grandegan beston kaj la veziro kuraĝigis la princon persekuti ĝin. La princo postrajdis ĝin ĝis li ne plu estis videbla kaj la besto tiam malaperis en la dezerto, lasante la princon sen ideo kien iri. Ĝuste tiam, antaŭ si, li ekvidis plorantan knabinon kaj kiam li demandis al ŝi, kiu ŝi estis, ŝi diris al li: ‘Mi estas filino de unu el la reĝoj de Hindujo kaj dum mi estis en ĉi tiu dezerto mi iĝis dormema. Tiam, antaŭ ol mi komprenis tion, kio

okazis, mi defalis de mia bruto kaj restis sola, ne sciante kion fari.’

Kiam la princo aŭdis tion, li kompatis la knabinon kaj prenis ŝin malantaŭ si, sur la dorso de sia ĉevalo. Survoje, li pasis ruinitan konstruaĵon kaj la knabino diris ke ŝi volis malpezigi sin. Li deĉevaligis ŝin, sed ŝi restis dum tiom longa tempo ke li decidis sekvi ŝin, nur por malkovri ke, kvankam li ne rimarkis tion, ŝi estis ina Ĥulo (1) kaj ŝi estis diranta al siaj infanoj: ‘Mi venigis dikan junulon hodiaŭ al vi.’ ‘Venigu lin al ni, panjo,’ ili diris, ‘por ke ni englutu lin.’ Aŭdinte tion, la princo ekstremis, timante por sia vivo kaj estis certa, ke li tuj mortos. Li estis retiriĝanta, kiam la Ĥulino eliris kaj vidinte lin en paniko kaj tremetanta, ŝi demandis pro kio li timas. ‘Mi havas malamikon kiun mi timas,’ li diris al ŝi. ‘Ĉu vi nomas vin princo?’ ŝi demandis, kaj kiam li jesis, ŝi daŭrigis: ‘Kial vi ne subaĉetas lin per via mono?’ ‘Li ne akceptas monon, li volas nur mian vivon,’ li diris al ŝi, aldonante: ‘mi timas lin kaj mi eraris.’ ‘Tiuokaze, se tio, kion vi diras estas la vero, tiam petu helpon de Dio,’ ŝi diris, ‘ĉar Li protektos vin kontraŭ la malbono de via malamiko kaj la malbono pro kio vi timas lin.’ Je tio la princo levis la kapon al la ĉielo kaj diris: ‘Dio, kiu respondas al la preĝoj de tiuj en mizero kiam ili vokas Vin, kaj Kiu forigas la malbonon, helpu min kontraŭ mia malamiko kaj forigi lin de mi, ĉar Vi havas la povon fari tion, kion Vi volas.’

Post ŝi aŭdis la preĝon de la princo, la Ĥulino forlasis lin. La princo reiris al sia patro kaj kiam li sciigis lin pri la konsilo de la veziro, lia patro alvokis la homon, kaj lin mortigis. Kaj pri vi, via reĝa moŝto, se vi fidas tiun saĝulon, li vidos ke vi mortos la plej malbonan de la mortoj, kaj ĝi estos la viro, tiu, kiun vi tiel bone traktis kaj akceptis kiel amiko, tiu, kiu ekstermos vin. Ĉu vi ne vidas, ke li kuracis vian malsanon el ekstero per io, kion vi tenis en la mano, do kiel vi povas esti certa ke li ne mortigos vin per io alia, kion vi tenos?”

“Tio, kion vi diras estas ĝusta, veziro, mia vera konsilisto,” konsentis la reĝo, “tiu homo venis kiel spiono por ekstermi min kaj se li povis resanigi min per io, kion mi tenis, eble li povos mortigi min per io, kion mi flaros.”

Tiam la reĝo demandis la veziron pri tio, kion oni faru pri Duban. La veziro diris: “Voku lin tuj, dirante ke li venu ĉi tien, kaj kiam li venos, dehaku lian kapon kaj tiam vi estos savita de ajna damaĝo li intencas fari al vi. Perfidu lin antaŭ ol li perfidos vin.” La reĝo konsentis kun la veziro, kaj alvokis Duban, kiu venis volonte, ne sciante kion Dio la Kompatema estis ordoninta. Tio estis kiel la poeto diris:

---

*Se vi timas vian sorton, vi ne estu en kolero,  
zorgos viajn la aferojn la farinto de la tero.  
Ĉar okazos nure tio, kio estis jam skribita.  
Vi sekuros, ĉar alio estos tute forbarita.*

Duban la saĝulo venis en la ĉeesto de la reĝo kaj recitis:

*Estas vere oportune montri viajn la meritojn  
Eĉ se parte ne komplete kaj eĉ malgraŭ viajn spitojn  
Diru, kiucele nune uzi miajn verk-spiritojn?  
Vi donacis al mi kvankam mi ankoraŭ ne demandis,  
sen prokrasto la favorojn al mi doni vi komandis.  
Kial do ne laŭdu mi vin proze, verse kaj muzike,  
verke kaj romane, danke, kaj sekrete kaj publike?  
Mi registros la profitojn, donacitan la amason,  
Vi forigis miajn zorgojn kaj pezigos mian kason.*

Li daŭrigis tion per alia poemo:

*Vi forgesu pri la zorgoj, kaj vi fidu nur al sorto;  
Ĝuu bonon kiu venos baldaŭ, tuj al via korto,  
Ne plu pensu pri pasinta tempo kaj ofenda vorto.  
Ja ekzistas multaj ĝenaj kaj malbelaj la eventoj  
kies sekvoj movos homojn post kompreno al  
kontentoj.  
Dio agas nur laŭ volo kaj ne home laŭ envio;  
Se vi kredas male certe staros kontraŭ via Dio.*

Li plue recitis:

*Lasu viajn viv-aferojn al Li, la Ĝentila Dio,  
dum ripozas via koro for de ĉia monda fio.  
Sciu, ke aferoj iras ne laŭ via daŭra preĝo,  
sed laŭ la decidoj, kiujn faras Dio, nia reĝo.*

Li tiam recitis:

*Vi kuraĝu, malstreĉiĝu, vi forgesu la dolorojn;  
la doloroj kaj la zorgoj ronĝas fortajn homajn korojn.  
Ne planadu, ho vi, kiu estas senebleca sklavo.  
Vi forlasu ĝin al Dio, vivu en feliĉa savo.*

La reĝo demandis lin: "Ĉu vi scias kial mi alvokis vin?" "Neniu scias tion, kio estas kaŝita krom Dio" Duban respondis. "Mi venigis vin," diris la reĝo, "por mortigi vin kaj preni vian vivon." Ĉi tio mirigis Duban, kiu diris: "Kial vi mortigos min, via Reĝa majesto, kaj kio estas mia kulpo?" "oni diris al mi, ke vi estas spiono," respondis la reĝo, "kaj, ke vi venis por murdi min. Mi intencas mortigi vin antaŭ ol vi povas fari la samon al mi." La reĝo tiam vokis la ekzekutiston kaj diris: "Detranĉu la kapon de tiu perfidulo, do ke ni estu

libera de lia malbono." "Ŝparu min", diris Duban, "kaj Dio indulgos vin; ne mortigu min, por ke li ne mortigu vin."

Li tiam ripetis tion, kion mi ripetis al vi ifrito, sed vi ne forlasos vian intencon mortigi min. Simile, la reĝo insistis: "Mi ne estos sekura se mi ne mortigos vin. Vi resanigis min per io, kion mi tenis en mia mano kaj mi ne povas esti certa ke vi ne mortigos min per io, kion mi flaros aŭ en ia alia maniero." Duban diris: "Mia rekompenco de vi, ho reĝo, estas la rekompenco de bono per malbono," sed la reĝo insistis: "Vi devas esti mortigota senprokraste."

Kiam Dubajo estis certa, ke la reĝo tuj mortigos lin, li ekploris kaj funebris pro la bono li faris al senmeritulo, kiel la poeto diris:

*Maimuna (2), nia bebo, ja ne havas ŝi prudenton,  
kvankam ŝia patro havas kaj prudenton kaj talenton.  
Kiu iras sur deklivo, kiu glitan teron spitas,  
Tiu senpripenson faras, kaj li falon ja meritas*

La ekzekutisto tiam venis, kovris la okulojn de Duban kaj elprenis sian glavon, petante permeson de reĝo procedi. Duban ploris kaj petegis la reĝon: "Indulgu min, kaj Dio indulgos vin; Ne mortigu min, por ke Dio ne mortigu vin." Li recitis:

*Donis mi konsilon bonan sed mi ne ricevis fidon,  
Dum aliaj ja sukcesis, nur uzante fi-perfidon.  
La konsilo mia tiam kaŭzis humiligan ridon.  
Se mi vivos, mi ne donos mian la konsilon ree;  
se mi faros, konsilantoj estu malbenitaj vee.*

Tiam li diris al la reĝo: "Se tiu estas, kiel vi rekompencas min, ĝi estas la rekompenco de krokodilo." La reĝo petis la historion de la krokodilo, sed Duban respondis: "Mi ne povas rakonti ĝin al vi, en tiu stato. Mi petegas vin indulgu min je Dio, por ke Dio indulgu vin." Je tio unu el la korteganoj de la reĝo leviĝis kaj petis la reĝon ŝpari la vivon de Duban, rimarkante: "Ni ne vidis ke li faris al vi ajnan malĝustajon, sed nur ke li savis vin de malsano kiun neniu alia kuracisto povis trakti." La reĝo diris: "Vi ne scias, kial mi ordonis sian mortigon, sed tio estas ĉar, se mi volos pardoni lin, mi mem certe mortos. Viro kiu kuracis min de mia malsano per io, kion mi tenis en mia mano povas mortigi min per io, kion mi flaros. Mi timas, ke li estis subaĉetita por murdi min, ĉar li estis spiono kaj tio estas kial li venis ĉi tien. Li devas esti ekzekutita, kaj poste mi estos savita."

Duban ripetis sian plendon por kompato, sed komprenante ke li ne povos eviti ekzekuton, li diris al la reĝo: "Se mi devas esti mortigita, permesu al mi

prokraston por ke mi reiru al mia domo, donu instrukciojn al mia familio kaj al miaj najbaroj pri mia entombigo, pag miajn ŝuldojn kaj fordoni miajn librojn pri medicino. Mi havas tre specialan libron kiun mi prezentos al vi por konservigi ĝin en vian trezorejon.” “Kio estas en tiu libro?” demandis la reĝo. “Sennombraj sekretoj,” Duban respondis, “kaj unu el tiuj estas ke, se vi forigos mian kapon kaj tiam malfermos tri paĝojn en ĝi kaj lego tri liniojn en la maldekstra paĝo, mia kapo parolos al vi kaj respondos ĉiujn viajn demandojn.” La mirigita reĝo tremis de ĝojo. “Kiam mi forigos vian kapon, ĉu vi vere parolos al mi?” li demandis. “Jes,” diris Duban. “Ĉi tiu estas nekredbla afero!” ekkriis la reĝo, kaj li forsendis lin kun eskorto.

Duban revenis hejmen kaj solvis ĉiujn liajn aferojn, kaj tiam la sekvan tagon li revenis al la kortego, kie ĉiuj veziroj, ĉambelanoj, deputitoj kaj oficistoj de la ŝtato kunvenis, kaj la loko aspektis kiel ĝardeno plena de floroj. Li eniris kaj estis venigita al la reĝo, portante sian malnovan libron kune kun ujo de kolirio (3) enhavanta pulvoron. Li sidiĝis kaj petis teleron, kiu estis tuj alportita. Li tiam verŝis la pulvoron sur la teleron kaj etendis ĝin, kaj post tio li diris: “Reĝo, prenu tiun libron, sed ne malfermu ĝin ĝis vi forigos mian kapon. Kiam vi faros tion, metu mian kapon sur la teleron kaj premu ĝin al la pulvoro. Je tio, la fluo de sango haĉtos kaj poste vi povas malfermi la libron.”

La reĝo prenis la libron de li kaj ordonis lian ekzekuton. La ekzekutisto dehakis lian kapon, kiu falis sur la teleron, kie ĝi estis premita en la polvon. La sango ĉesis flui kaj Duban la saĝa malfermis la okulojn kaj diris: “Ho reĝo, malfermu la libron.” La reĝo

faris tion, sed li trovis ke la paĝoj estis kungluitaj, do li metis sian fingron en sian buŝon, por malsekigi ĝin per sia salivo, kaj kun malfacileco li malfermis la unuan, la duan kaj la trian paĝojn. Li malfermis ses paĝojn entute, sed kiam li rigardis ilin, li povis trovi nenion skribita tien. “Saĝa viro,” li diris, “estas neniŭ skribo ĉi tie.” “Malfermu pliajn paĝojn,” diris Duban. La reĝo malfermis tri pliajn paĝojn, sed baldaŭ li sentis la venenon per kiu la libro estis trempita kaj kiu estis eniranta en sian korpon. Li estis turmentita de konvulsioj kaj kriis ke li estis venenita, dum Duban recitis:

*Ili ja kutimis uzi sian povon arogante,  
sed ĝi baldaŭ malaperis, kaj validis malkonstante.  
Se iliaj agoj justus, ili trovus nur justecon,  
Sed tiranis ili. Tempo agis do laŭ justa deco,  
kaj turmentis ilin multe; punoj kaj de ĉiu speco.  
Estis kvazaŭ ilin pune la admono morne sonas:  
'Tio estas nur pro tio, Tempo justas ne malbonas.'*

Tuj kiam la kapo de Duban finis paroli, la reĝo falis senviva. Sciu do, ifrito, se la reĝo ŝparus Duban, Dio ŝparus lin, sed li rifuzis kaj volis havi lin mortigita, do Dio detruis lin. Se vi indulgus min, Dio ŝparus vin...

(1) *Ĥulino [Ghul en la araba] estas malbonspirita ina monstro rilata al tombejoj kiuj formanĝas homan karnon.*

(2) *Maimuna estas islama nomo por bebo kaj ĝia signifo estas 'sekureco, fidindeco'.*

(3) *kolirio estas medikamento, aplikata sur la malsanan konjunktivon de okulo.*

## Festo de Z-Tago kaj jubileo de ILEI en Armenio

(23/12/2019)

En Armenio oni festis la 160-an datrevenon de Zamenhof kaj 70-jaran jubileon de ILEI.

La membroj de la Armena sekcio de ILEI kunvenis por pridiskuti la nunan staton de Esperanto-movado en Armenio kaj la agadplanon por la venanta jaro. Oni parolis pri la eventoj, vojaĝoj kaj renkontiĝoj okazintaj dum la jaro 2019 kaj pri la evoluigo de Esperanto-turismo en Armenio.

La kunveno estis aranĝita en unu el la famaj restoracioj en Erevano kaj pasis en tre agrabla etoso.

Varmajn salutojn kaj elkorajn bondezirojn okaze de la Kristnaskaj kaj Novjaraj festoj.



Plej amike,

**Karine Arakeljan**

Komitatano kaj Presidanto de la Internacia Ekzamena Komisiono de ILEI/UEA

## Movada temo: UN 75-jariĝas: Esperanto bezonas Unuiĝintajn Naciojn, sed Unuiĝintaj Nacioj bezonas esperantistojn

■ Renato Corsetti

Malgraŭ la disvastiĝo de potenĉegaj komunikaj iloj aŭ eble ankaŭ pro ili, la mondo restas ĉiam la sama, ĉar homoj restas samaj kun siaj virttoj kaj malvirttoj. Certe ekzistas la esperantistoj, kaj ilia toleremo kaj komprenemo por aliaj homoj kaj popoloj kaj ilia serĉo pri justeco, egaleco kaj paco. Sed samtempe ekzistas multaj aliaj homoj, kiuj predikas malamon kontraŭ la plej malfortaj, maltoleremon al aliaj kulturoj, perforton por solvi konfliktojn. Unuvorte, la nuna mondo estas kiel la mondo en la tempo de Zamenhof aŭ eĉ en la tempo de la antikva Babilono. La mondo ŝanĝiĝas nur pri detaloj, ne pri la kerno.

Eĉ male, dum la lastaj jardekoj progresas en multaj lokoj de la mondo maltoleremo kaj perfortemo ĉiam pli kaj pli.

En ĉi tiu situacio Esperanto restas, por uzi la versojn de Kalocsay:

*Ne glora kaj fiera,*

*Nur orfa, senpotenca, senforta, senmatura,  
Svenema kaj senhelpa kaj – eble – senespera,  
Sed nobla, blanka, klara kaj senmakule pura.*

Fortoj, kiuj esprimis de tempo al tempo sian subtenon al Esperanto, estas la mondaj organizaĵoj, kiel Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko, ĉar principe ili havas la samajn celojn kiel ni: plibonigi la mondon. Pro tio ni bezonas ilin por disvastigi Esperanton en la mondon. Diris Zamenhof: “La registaroj venas kun sia sankcio kaj helpo ordinare nur tiam, kiam ĉio estas jam tute preta”.

Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko povus esti niaj aliancoj, eĉ se en la nuna mondo ankaŭ ili ne fartas tre bone.

Se UN vokas, UEA respondas.

Ne hazarde la kongresa temo en la venonta UK en Montrealo estas: “UN 75-jara: Dialogo kaj interkompreniĝo en ŝanĝiĝanta mondo.”

La vortumo de la temo sekvas la ŝablonon de UEA pri neŭtraleco kaj

pozitiveco ĝis la morto, ĉar, kiel mi diris antaŭe, la mondo estas ĉiam la sama kaj eventuale malpliboniĝas, eĉ se ni kaj UN volas dialogon kaj interkompreniĝon.

Nu, kongresaj temoj estis ofte ĝis nun nur ĝenoj por la kongresanoj, tuj forgesataj antaŭ ol eniri la vagonaron aŭ aviadilon por reveni hejmen. Ĉu vi ne kredas min? Bonvolu citi la lastajn 5 kongresajn temojn de la UK-oj, kiujn vi ĉeestis!

Ĉi-jare la afero volas esti pli serioza kaj jam oni faras grandajn provojn aranĝi plenajn kunsidojn pri la temo, dissendojn al neĉeestantoj, kaj eblon de neĉeestantoj aŭdigi sian voĉon. Koloraj flagoj flirtos kaj oratoroj oratoros, ktp.

Tio estas io bona. Finfine oni parolos pri io serioza kaj serioze ligita al Esperanto; sed tio, laŭ mi ne sufiĉas.

Mi pensas, ke ĝi devas iĝi “movada temo”, temo de la tuta movado, ankaŭ por tiuj multaj, kiuj pro multaj kialoj ne povos vojaĝi al Montrealo. Ne temas pri festado de la 75-jariĝo de UN, temas pri decido pri tio, kion ni povas fari por helpi UN-on atingi 100 jarojn, por ke ĝi helpu nin plibonigi la mondon per Esperanto.

Ni devas debati pri tri grandaj agadkampoj de UN kaj Unesko:

**Homaj rajtoj.** Ĉu ni volas aŭ ne, ni estas la solaj batalantoj en la mondo por la lingvaj homaj rajtoj, kontraŭ diskriminacioj bazitaj sur la lingvo, kiel UN estas la batalanto pri homaj rajtoj ĝenerale. Bonvolu legi ree la deklaron pri homaj rajtoj, kiun vi trovas en Esperanto en <https://tinyurl.com/yxd7uv5v>, debatu pri ĝi en via loka klubo kaj en via landa informilo. Se vi atingas konkludojn, kiujn vi volas konigi al la debatantoj en Montrealo, por ke ili konsideru vian opinion dum la pretigado de la rezolucio, simple skribu al mi, [renato@esperanto.org](mailto:renato@esperanto.org), kaj mi komunikos tion al ili.

**Paco.** Memoru niajn glorajn tradiciojn pri paco, de la kontaktoj kun

Bertha Von Suttner ĝis la esperantistoj mortigitaj de faŝismaj, militemaj reĝimoj tra la mondo. Se vi ne ŝanĝis vian opinion pri tio, vi eble volos subteni la agadon de UN por eviti armilkomercadon kaj entute militojn. Diskutu ankaŭ pri tio en via loka klubo aŭ en via landa informilo. Informiĝu pri la sistemo de UN-asocioj, <https://tinyurl.com/y4cpdjlh>, kaj de Unesko-kluboj, <https://tinyurl.com/y5a9v42o>, kaj kunlaboru kun ili loke aŭ lande. Raportu al UEA pri via kunlaboro.

**Evoluo.** Mia daŭra manĉo/slogano estas, ke ni volas pli bonan mondon, pli justan mondon en la kampo lingva-kultura. UN kaj Unesko volas pli bonan mondon ĝenerale.

Kion ni povas fari tiurilate? Aldone al tio menciita en la punkto ĉi-supre bonvolu legi ĉi tion: <https://tinyurl.com/y4755pbs>.

Diskutu pri tiuj celoj en viaj lokaj grupoj kaj en viaj landaj informiloj. Se vi atingas konkludojn, kiujn vi volas konigi al la debatantoj en Montrealo, agu same kiel ĉi-supre: skribu al mi, [renato@esperanto.org](mailto:renato@esperanto.org), kaj mi komunikos tion al ili.

Unuvorte, informiĝu pri UN kaj Unesko kaj disvastigu Esperanton kiel elementon de la programo de UN kaj Unesko por plibonigi la mondon.

Fine, se vi volas esti aparte afablaj, reaperigu ĉi tiun artikolon en via loka bulteno, fejsbuka paĝo, landa informilo ktp.



**uea.facila** estas nova retejo, kies celo estas informi novajn esperantistojn pri la Esperanto-movado per mallongaj, facillingvaj artikoloj. Vidu ekzemple jenan raporton pri la lasta Mez-Orienta Kunveno <https://uea.facila.org/artikoloj/kongresoj-kaj-kunvenoj/plie-pri-la-mez-orienta-kunveno/>

Krome ĝi enhavas ĝeneralajn legaĵojn, rekomendojn pri legolibroj por lernantoj, sinprezentojn de legantoj, kalendaron de renkontiĝoj, kaj multajn aliajn interesajn aferojn por homoj, kiuj la unuan fojon malkovras Esperanton. Serĉu: <https://uea.facila.org>.

The screenshot shows the homepage of **uea.facila**, titled "FACILAJ ARTIKOLOJ EN ESPERANTO". The page features a navigation menu with categories like "Artikoloj", "Filmetoj", and "Kunvenoj". Below the navigation, there's a search bar and a "Montri ĉiujn kategoriojn" button. The main content area displays a grid of article cards:

- Nova retejo por novaj esperantistoj**: Verkis Anna Löwenstein en Ĝenerale. 10an de januaro. 12 komentoj 2249 vidoj.
- Homoj el 22 landoj vizitas Esperantuĵon**: Verkis Maurizio Giacometto en Kongresoj kaj kunvenoj. Hieraŭ je 11:31. 0 komentoj 89 vidoj.
- Vivo de Zamenhof**: Afisís Rico en Libroservo. 1 komento 224 vidoj.
- La surpriza magio de NASK**: Verkis Aŭtunjo Ward kaj Miĉo Harden en Kongresoj kaj kunvenoj. 1 komento 256 vidoj.
- Antaŭdiro de la ciganino**: Afisís Anna en Legajoj. 25an de julio. 0 komentoj 212 vidoj.
- Esperanto en scienca artikolaro**: Verkis Dima Ševĉenko kaj Anna Striganova en Ĝenerale. 4an de julio. 2 komentoj 350 vidoj.
- Tutmonda Asocio de Esperantistaj Nefumantoj**: Verkis Rob Moerbeek en Movado. 3an de julio. 3 komentoj 443 vidoj.
- Surpriza malkovro en Texel**: Verkis Eric Lee en Ĝenerale. 1an de julio. 6 komentoj 687 vidoj.

At the bottom of the page, there is a pagination bar showing "Paĝo 1 de 10".